

# Eŭropa Bulteno

Oktobero 2014, Numero 142

## DONALD TUSK PLENUMIS LA PROMESON



Dum Ekonomia Forumo en Krynica en septembro 2011 mi kaptis sinjoron Donald Tusk, registarprezidanton de Pollando, por demandi pri lia promeso, kiun li donis al nia "generacia socio de senioroj" dum renkontiĝo kun gvidantoj kaj organizantoj de Universitatoj de la Tria Aĝo en Szczawnica julie samjare. La renkontiĝo estis tre sukcesa, li eksciis tie kiom multe ni "tria-aĝuloj" faras, kaj ke ni estas granda, tre valora parto de la socio... Tiam, en Szczawnica, li promesis, trovi plian monon en la budĝeto por helpi disvolviĝon de agado por senioroj. Mi aldonas foton, kiam post nia diskutado Tusk alvenis al mi surstrate kaj neatendite komencis interparoli kun mi! La dua kuniranto estas vojevodo Malopolski (Malgrandpolia) Stanisław Kracik, kiu gastigis Tuskon en nia regiono.

En Krynica mi kaptis Tuskon refoje por demandi, ĉu li sukcesis trovi la promesitan monon por la aktivado de pliaĝuloj kaj li tuj respondis: Jes, vi ankoraŭ ĉi-jare ricevos 40 milionojn da zlotoj, kaj ĉiu-jare nia Oficejo pri tio zorgos. Neniu kredis al mi, ke mi la unua eksciis pri la sumo! Post iom da tempo vere venis oficiala letero de Ministerio de Laboro kaj Socia Politiko.



Mi donis al li E-broŝuron, kiun li tenas en la mano, montrante al li nian apudan Esperanto-standon en la tiama Ekonomia Forumo. Li rigardis la broŝuron kaj diris ke en Sopot (lia urbo) esperantistoj havas sian Ŝtonmonumenton kaj estas rimarkeblaj. Li do scias ke en lia urbo ekzistas Esperanto kaj plu iris kun nia broŝuro »Esperanto - fascina lingvo«, preparita kaj presita de E@I ankaŭ en la polalingvo. Kaj nun sinjoro Tusk iĝis prezidanto de Eŭropa Konsilio!

Ni atendas nun la informon de Instituto de Kultura Heredaĵo de Pollando enlistigon de Esperanto sur la polan liston de kulturheredaĵoj por agi baze de tiu grava agnosko en Pollando kaj en Eŭropa Unio. Ni eble povos tiusence kontakti ankaŭ sinjoron Tusk en lia nova ofico.

Halina Komar

## 60-JARIĜO DE LA MONTEVIDEA REZOLUCIO DE UNESCO

En La jaro 1954 okazis ĝenerala konferenco de UNESCO en Montevideo kie partoprenis ankaŭ la delegitaro de UEA, kiun gvidis d-ro Ivo Lapenna. UEA prezentis al la konferenco proponn de rezolucio kiu agnoskus Esperanton kiel gravan kulturatingaĵon por la mondo. Malgraŭ la kontraŭado de pluraj, aparte de la gvidanto de la Dana delegitaro, post lerta parolado de Ivo Lapenna, la tre pozitiva deklaro, unua tiaspeca atingita ĉe granda monda organizaĵo estis akceptita.



Jen ĝi: La rezolucio akceptita de la Ĝenerala Asembleo, la 10-an de decembro 1954, sekve de kelkara kampanjo kunordigita de UEA, precipe de ĝia estrarano Ivo Lapenna.

IV.4.422

La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto:

IV.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

IV.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;

IV.4.4223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

IV.4.4224 Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

Estus grave ke laŭeble multaj esperantistoj eluzu la 60-jariĝon de la rezolucio por atentigi pri ĝi ekster la Movado. Estus bone ke oni traduku ĝin al siaj naciaj lingvoj kaj kune kun artikolo pri tio sendu al lokaj kaj naciaj medioj okaze de la Tago de Homaj Rajtoj la 10-an de decembro kaj ankaŭ lige al Zamenhofa tago. Eblas ankaŭ mencii ke UNESCO konfirmis sian starpunkton en la dua rezolucio pri Esperanto en la konferenco en Sofio en 1985, por kiu la ĉefmerita estis tiama reprezentanto de UEA Tibor Sekelj.

La rezolucio XI.4.4.218 akceptita en la 23-a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko la 8-an de novembro 1985 okaze de la 36-a plena seanco:

11.11 - Festado de la centjariĝo de Esperanto.

La Ĝenerala Konferenco,  
Konsiderante, ke ĝi en sia sesio de 1954, okazinta en Montevideo, per la rezolucio IV.1.422-4224 notis la rezultojn, atingitajn pere de la internacia lingvo Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj reciproka kompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj agnoskis, ke tiuj kongruas kun la celoj kaj idealoj de Unesko,

Memorigante, ke Esperanto intertempe faris konsiderindan progreson kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj, penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj agadoj,

Agnoskante la grandajn eblecojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj de malsamaj naciecoj,

Notante la tre gravan kontribuon de la Esperanto-movado, kaj precipe de la Universala Esperanto-Asocio, al la disvastigado de informoj pri la agado de Unesko, same kiel ĝian partoprenon en tiu agado,

Konscia pri la fakto, ke en 1987 oni festos la centjariĝon de la ekzisto de Esperanto,

1. Gratulas la Esperanto-movadon okaze de ĝia centa datreveno;
2. Petas la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj;
3. Invitas la Ŝtatojn-Membrojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado;
4. Rekomendas al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj aliĝi al la festado de la centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn, inkluzive de tiuj pri la agado de Unesko.“

Zlatko Tišljariĉ

## ESPERANTO EN OFICIALA TABELO DE ARANĜOJ DE KONSILIO DE EŬROPO



Konsilio de Eŭropo kies membroj estas ĉiuj landoj de Eŭropa Kontinento lanĉis Eŭropan Tagon de Lingvoj la 26-an de septembro kaj tiukaze ĝi aperigas sur sia paĝaro liston de ĉiuj aranĝoj dediĉitaj al tiu ĉi tago.

<http://edl.ecml.at/Home/tabid/1455/language/de-DE/Default.aspx>

Ĉi-jare estis entute 735 aranĝoj en la retejo inter kiuj 10 kiuj havis en la titolo Esperanton aŭ kiuj okupiĝis ankaŭ pri Esperanto, do ĉirkaŭ 1,3 %. Laŭ mi tio estas bona rezulto, kvankam povus esti pli bona, se lokaj esperantistoj engaĝiĝus pli aktive kaj se la E-asocioj iom pli kampanjus pri tio.

Ni do pensu jam nun pri la sekvajara Eŭropa Tago de Lingvoj. Jam amasa apero en tiu listo estas prestiĝe kaj informe grava sed la aranĝoj mem ankaŭ levas nian konatecon ĉie kie ni ion okazigas publike.

Maja Tiŝljar

## La 22-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO, SALOU 4 -11.10. 2014



Komence de oktobro la urbo Salou situanta proksime de Tarragono en Hispanio gastigis la kvaran fojon Internacian E-Semajnon. Jam de kelkaj jaroj la nombro de ĝiaj partoprenantoj superas 140. Ĉi-foje ili venis el dekdu landoj. Alloga loko ĉe la maro altiras geesperantistojn por komuna unusemajna restado en bona etoso. Multaj jam konas unu la alian, sed ĉiam aperas novuloj, kiuj bone integriĝas al la grupo de fideluloj. La plej aĝaj estis la geedza paro el Katalunio: Trini García 97-jaraĝa

kaj Joseph Colom baldaŭ 100-jaraĝa! Al ili estis ĉi-jare aljuĝita la premio “Ada Sikorska Fighiera” pro ilia meritplena laboro por Esperanto.

En la solena inaŭguro ĉeestis kaj bonvenigis nin la urbestro de Salou s-ro Pere Granados Carillo. Li prezentis al ni la urbon el la vidpunkto de turismo, substrekis gravecon de Esperanto kaj deziris al ni sukcesplenan restadon kaj fruktodonan laboron. Poste okazis komuna fotado. Dum la semajno okazis E-kursoj. Progresantojn gvidis la sperta instruantino



Rodica Todor el Rumanio. Ĉi-foje ŝi proponis tre interesan temon: “Esperanto - Ponto inter kulturoj en multlingva, pluretna socio”. Ŝi klarigis FLAM-analizon, laŭ kiu ni poste en grupoj diskutis kaj faris konkludojn. FLAM temas pri: Fortoj-Lamaĵoj-Avantaĝoj-Minacoj. Pluraj partoprenantoj en tiuj diskutoj rakontis pri siaj spertoj rilate la instruadon, redaktadon de lokaj bultenoj aŭ organizadon de diversaj aranĝoj kaj staĝoj. Ili dividis siajn sciojn kaj spertojn kun aliaj.

- Pri komencantoj okupiĝis Thierry Saladin. Li ankaŭ prezentis prelegon kaj klarigis pri la internacia peticio titolita “Esperanto, oficiala lingvo de Eŭropa Unio Tuj!” iniciata de 16-jaraĝa junulo en februaro 2013. La deziro estas akcepti Esperanton TUJ! Tiucele estis fabrikitaj T-ĉemizoj, kiujn Thierry vendadis dum la aranĝo.
- Gian Carlo Fighiera regalis nin per la verko de Alexander Puŝkin “La Neĝoŝtormo” kaj “La Damo de Piko”. Fine ni ĝuis la novelon “Palto” de Nikolaj Gogol.
- Floreal Gabalda projekciis filmon el Nepalo pri la “Speciala Renkontiĝo”, okazinta tie ĉi-jare komence de marto. Ni partoprenis en ĝi. Multaj aprezis la filmon kaj demandoj pri niaj spertoj ne mankis.
- Marcel Delforge parolis pri siaj vivspertoj kaj rakontis pri kelkaj el siaj multnombraj vojaĝoj en Esperantio ilustrante ilin per kelkaj bildoj.
- Rafaela Urueña prezentis sian libron ”Eŭropo paŝon post paŝo” el jura vidpunkto. Intereso pri kelkaj ekzempleroj kiujn ŝi kunportis estis granda kaj la stoko rapide elĉerpiĝis.
- János Petik prezentis la temon ”La disvastigo de Esperanto”, sed antaŭe li parolis pri kelkaj gramatikaĵoj.



Vesperaj programeroj inkluzivis du interkonatiĝojn. Maria Ferigle Danti prezentis per DVD operon “Il trovatore”. Ŝia edzo Luis Serrano Pérez animis du vesperajn debatojn: “Kiun influon havas nia movado en la socio?” kaj “Ĉu la Semajno bone funkciis?”. Oni povas diri, ke “jes” malgraŭ kelkaj malglataĵoj. Luis ĉefe okupiĝis pri libroservo. Je

dispono de la partoprenantoj estis ankaŭ fotoalbumoj. La ĉeestantoj povis trarigardi ilin kaj ekmemori antaŭajn E-Semajnojn kaj aliajn E-eventojn. Unu el la plej atendataj kaj ŝatataj eventoj estas la folkloro vespero kun la ensemblo *Montjuic*, kiu ĉiam regalis nin per belaj havanaj kantoj instigaj al dancado. Tiuokaze ne mankas *Cremat* - bongusta trinkaĵo el bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj.

Okazis unu tuttaga kaj du duontagaj ekskursoj. Pri la gvidado zorgis Rosa López kaj Antonio Martinez. Ni vizitis groton de Maravelles. Kuriozaĵo en tiu groto estas, ke el la plafono pendas kelkaj kalkaj formaĵoj kreskantaj ĉiudirekten. Partoprenantoj de la alia duontaga ekskurso vizitis la urbon Tarragono. Kelkaj profitis belan veteron por refreŝiĝo en la hotela naĝejo aŭ en la maro, aliaj promenis tra la urbo Salou, iuj vizitis la amuzparkon “Bona Aventuro”. Grupeto de piedirantoj promenis ĝis novkonstruita lumturo situanta ne tro malproksime de la *Cap Best Hotel*, en kiu ni loĝis. Survoje al ĝi Antoni Comellas atentigis nin

pri kelkaj botanikaj plantoj kaj kompetente informis pri ili. La tuttaga ekskurso gvidis nin al la urbo Amposta, kie ni enŝipiĝis kaj navigis sur la rivero Ebro ĝis la maro.

Koran dankon al la katalunaj samideanoj pro ilia fervora laboro kaj okazigo de tiu-ĉi plaĉa aŭtuna evento al kiu ni jam sopiras venontjare.

Liba Gabalda

## INTERLINGVISTIKA SIMPOZIO LA 3-AN FOJON EN UAM



La 3-an Interlingvistikan simpozion en la Lingvistika Instituto (Novfilologia Fakultato) de la Universitato Adam Mickiewicz (UAM, Poznano) kun la ĉefa temo *Problemoj de internacilingva komunikado kaj iliaj solvoj* malfermis prof. Marek Nawrocki, vicrektoro de UAM, parolis d-ro Paweł Nowakowski, vicdirektoro de la Lingvistika Instituto kaj Kajetan Pyrzyński, honora konsulo de Peruo. En nia

tutmondiĝinta epoko la internacia kaj interkultura komunikado estas ĉiutaga neceso, pro tio la simpozio koncentriĝis al temoj: Kiuj estas la scenaroj de efika komunikado certiganta ankaŭ la egalecon de la partneroj? Kiom estas la kostoj, investoj por ĝin atingi? Kiel ni povas konservi kaj transdoni niajn naciajn kulturajn valorojn kaj identecon en la multkultura mondo? Kiel konstruitaj lingvoj povas kontribui al la internacia komunikado? Kiel Esperanto peras inter kulturoj? Okazis kvar ĉefprelegoj kaj 34 prelegoj en du sekcioj en la tri oficialaj lingvoj: Esperanto, pola kaj angla. Pli ol 60% de la partoprenantoj (ĉ. 70 personoj) estis eksterlandano. La sekcio pri lingvopolitiko traktis aktualajn demandojn en Ukrainio, en la eksjugoslaviaj ŝtatoj, Litovio kaj Kimrujo. Temis ankaŭ pri la influo de la angla al naciaj lingvoj kaj pri la psikologia ekonomio de la industrio de la angla lingvo. Ankaŭ la lingvouzo en Afriko estis tuŝita. La sekcio pri tradukado analizis la kulturo-transigajn problemojn de tradukado. La ĉefprelego de S. Fiedler prezentis la tendencojn en la fakliteraturo solvi la problemojn de la internacia komunikado, tiu de I. Ertl aplikojn kaj misaplikojn en la lingvopolitiko de la Eŭropa Unio. Ĉu eblas analizi Esperanton laŭ kriterioj aplikataj al naturaj lingvoj – revenis en la ĉefprelegoj de N. Dols kaj I. Koutny. Interkultura komunikado per Esperanto aperis en pluraj prelegoj, traktantaj, ekzemple, la eblecojn en internacia komunumo, inter malsamlandaj lernejoj kaj en familio. Okazis prelego pri logikecoj en lingvoj, kritiko de la malfortaj punktoj de Esperanto kaj reciprokaj influoj inter Esperanto kaj gepatraj lingvoj de la parolantoj. Okazis prelego pri klasifiko de konstruitaj lingvoj, pri la vojo de Bliss-sistemo de planlingvo al helpilo por la handikapitoj. La ekzemplo de Sanskrito montris, ke lingvoplanado jam okazis antaŭ pluraj mil jaro. La programo kaj resumo troviĝas en: <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/simp14programo.html>. Elektitaj artikoloj aperos en la universitata lingvistika revuo JKI (Lingvo. Komunikado. Informado).

La simpozion antaŭis la unua sesio de la Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj, startigitaj jam la 6-an fojon ekde 1998 en la Lingvistika Instituto sub la gvido de prof. Ilona Koutny. 26 aliĝintoj el 14 landoj komencis sian 3-jaran studadon.



Ni intervjuis mallonge unu el la gastoj kiuj kontribuis kaj al la programo de sesio kaj de la simpozio: Sabine Fiedler (profesoro en la angla fako de la Universitato en Leipzig, prezidanto de la Germana Interlingvistika Societo)

### **Pri kio okupiĝas interlingvistiko?**

Unu el la problemoj de interlingvistika esplorado estas, ke la termino “interlingvistiko” estas diversmaniere komprenata kaj uzata. Tion, cetere bone

prilumis la simpozia prelego de Szabolcs Szilva Diversaj aliroj al la klasifiko de planlingvoj, prezentante la rezultojn de sia diplomalaboro por la Postdiplomaj Studoj en Poznan. Laŭ la opinio de la germana Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik e.V.: [www.interlinguistik-gil.de](http://www.interlinguistik-gil.de)) la studobjekto de interlingvistiko estas internacia lingva komunikado kun ĉiuj aspektoj (i.a. lingvistikaj, kulturaj, ekonomiaj kaj politikaj). La fokuso de interlingvistikaj studoj estas la strukturo kaj funkcio de planlingvoj kiel ekz. Esperanto.

### **Via anglalingva ĉefprelego trarigardis la fakliteruron en la tereno internacia komunikado kaj planlingvoj. Kiun rolon povas havi Esperanto en la komunikado de EU?**

Esperanto (aŭ alia planlingvo) ĝis nun ne estis vere sukcesplena en sia tasko plifaciligi grandskale internacian lingvan komunikadon. Pro tio oni povus atendi, ke planlingvo tute ne ludas rolon en la fakliteruro pri lingvopolitiko kaj lingvistiko. Sed tio ne ĝustas. Ŝajnas, ke esploristoj en tiu tereno ne povas ignori la temon. En la fakliteruro estas diskutataj la avantaĝoj de uzado de planlingvo (kiel komunika egalrajteco, efikeco, la t.n. propedeŭtika valoro) kaj malavantaĝoj (malbona reputacio, limigita komunika funkcio, eŭropeca karaktero de Esperanto); temoj kiel la ekzisto de propra kulturo, la evoluo de la lingvo kaj la influo de denaskuloj estas traktataj kiel debateblaj aspektoj. Por respondi al la demando: Por la komunikado de EU nuntempe ne gravas unu unueca lingvo – nek nacia, nek planlingvo –, sed la konservado de multlingveco. Ĉu Esperanto kapablas kontribui al tiu (ekz. kiel pontlingvo por tradukado – kiel R. Phillipson proponis en sia libro *Only-English Europe* ‘Nur-angla Eŭropo?’ en 2003 – tion oni devas detale pristudi.

### **Viaj esploroj rilatas ankaŭ al frazeologio de la angla kaj de Esperanto, vi aperigis pri ambaŭ librojn. Ĉu eblas paroli pri frazeologio de planlingvo?**

Kompreneble! Frazeologiaĵoj estas fiksitaj esprimoj, kiujn la lingvo metas je nia dispono pro ofta uzo en specifaj situacioj; temas pri fiksitaj vortgrupoj kaj frazoj, kiuj estas storataj kiel tutaĵoj en nia memoro. Ĉiu vivanta lingvo, lingvo uzata de parolantaro, enhavas ilin, do ankaŭ



Esperanto. Esperanta frazeologio, cetere, evoluas simile al tiuj de nacilingvoj: parto inter ili estas prunteprenitaj el aliaj lingvoj (ekz. la nigra ŝafo, formulo kiel en nuksoŝelo), t.e. ili estas internacie konataj; alia parto estas kunligita kun la vivo en la lingvokomunumo kaj malfacile tradukebla (ekz. Ne krokodilu!, La nepoj nin benos). La ekzisto de tiu laste menciita parto fakte estas pruvo por la viveco kaj esprimeco de la lingvo, por la kultureco de Esperanto, por tiel diri.

El La Balta Ondo  
Ilona Koutny

## NOVA LINGVA ORDO DE LA KATOLIKA EKLEZIO

La portalo „24 sata“ en la korata (<http://www.24sata.hr/svijet/papa-opet-uvodi-nesto-novo-latinski-vise-nece-biti-sluzbeni-388852>) skribas:

„Dum internaciaj kunvenoj de episkopoj en Vatikano oni parolos la italan, deklaris antaŭ ne longe la papo Francisko kaj per tio forigis la uzon de la latina, kiu ĝis nun en tiaj kunvenoj estis la oficiala lingvo. Ĝi estis uzata en dokumentoj kaj iuj el la episkopoj ĝin normale parolis. La novan decidon de la papo proklamis la hungara kardinalo Petro Erdo en la unua tago de la sinodo dum kiu 200 episkopoj diskutis pri familio. La latina, kiun ŝatis Benedikto, restas oficiala lingvo, tamen ne plu en parola uzo.“

Ĉu tio estas bona aŭ malbona por la perspektivoj de Esperanto? Unuflanke bona, ĉar ĝi signifas ke post du-tri jardekoj neniu el episkopoj plu kapablos paroli la latinan kaj sekve Esperanto perdas konkurencanton kiel kandidato por neŭtrala lingvo en Eŭropo. Aliflanke la forigo de la latina fortigas la pozicion de la angla, ĉar la itala ne povas konkurci al ĝi dum la latina havis avantaĝon de prestiĝa neŭtrala lingvo. La estonto montros kiajn konsekvencojn tio havos por la lingva situacio en la mondo.

Zlatko Tišljarić

## GRUNDTVIG-KUNSIDO EN GERMANIO



Inter la 4a kaj 6a de oktobro 2014 Katalin Kováts, redaktoro de edukado.net, partoprenis la projektogvidantan kunsidon en la Esperanto-urbo Herzberg, Germanio. Kiel jam komunikite, nia Fondaĵo Edukado.net partoprenas kun Centro de Interkultura Edukado (CEM) (Pollando – Nowy Sącz), Filio de Germana Esperanto-Asocio por



Klerigado kaj Kulturo (Germanio - Herzberg am Harz) kaj Kultura Esperanto-Asocio (KEA) (Hungario - Budapeŝto) komunan Grundtvig-projekton, titolitan *Kultura diverseco kaj multlingvismo de Eŭropo - kiel lerni pri ili?*. La nuna kunveno estis jam la kvara renkontiĝo de la partoprenantoj kaj ĝi celis meztempan kunordigadon, strategian konsultiĝon, taksadon de la ĝisnunaj eventoj kaj laboroj, krome decidojn pri la lasta renkontiĝo, okazonta en Herzberg, fine de majo 2015. La gvidantoj konfirmis la decidojn pri la respondeculoj de la administraj kaj arkivaj laboroj kaj pri la finproduktado de la dokumentoj kaj materialoj. La decido koncernas ankaŭ la retan kurson de nia klerigejo, kie ni planas lanĉi kvar kursojn pri la diverslandaj projekto-temoj.



La kunsido de la kunordigantoj tempe koincidis kun la metodika aranĝo Torpedo, regule okazigata de la Interkultura Centro Herzberg. Profitige de la ĉeesto de Katalin Kováts kaj László Szilvási, la partoprenantoj pere de prelegoj informiĝis pri la reta Esperanto-kurso por hungaroj, kompilita de László kaj pri la funkcio kaj ebloj de la klerigejo kaj ties kursoj, gvidataj de Katalin. La delegaciojn akceptis en la urbodomo Gerhard Walter, urbestro (parolanta en Esperanto!) kaj Rüdiger Brakel, eks-

ĉefo de la Popolaltlernejo de Regiono Osterode. Ni havis unuhoran spertinterŝanĝon pri la funkciado de liberaj universitatoj de Pollando kaj popolaltlernejoj de Germanio, graveco de lingvolernado kaj loko kaj rolo de Esperanto en la menciitaj klerigejoj kaj ties programoj. Danke al la gastigantoj Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar la dudeko da esperantistoj el Germanio, Pollando, Hungario kaj Nederlando havis kelkajn komunajn programojn, kiujn ili pasigis en tre bona kaj amika etoso.

Informojn pri la ĝisnunaj projekto-paŝoj vi povas vidi en la [publika resumaĝo de nia retejo](#).

Katalin Kováts, Edukado.net



## FESTI NOVJARE EN BITBURG

Bitburg estas apud Treviro (Trier) kaj Luksemburgio. Ĉu ankaŭ vi ŝatas kunfesti en la jam tradicia Novjara Renkontiĝo, kiu okazas ĉi-foje jam la 13-an fojon? Kunveni kun homoj el deko da landoj, sperti la kunestadon kun homoj el ĉiuj aĝgrupoj, de la plej etaj beboj ĝis

junuloj, mezaĝuloj kaj pliaĝuloj? Ĝui la proksimecon de Luksemburgio, Francio kaj Belgio - kaj revidi multajn homojn el ĉiuj tiuj landoj, ĉu? Nu, ni ĝojos bonvenigi vin al la ĉi-jarfina 13-a Novjara Renkontiĝo, kun aparta programo por junuloj, la 6-a Novjara Internacia Semajno (NIS).

Ĉi-foje Kim koncertos por ni, estos plia koncerto, teatraĵo, multaj prelegoj, diskutoj, laborgrupetoj, infana prizorgado, silvestra festo, promenoj kaj ekskursoj... Sed certe plej gravas la kunestado en amika rondo, personaj interparoloj pri ĉio ajn.

Daŭro ĝis la 4-a de januaro: Ĉar la 4-a de januaro estas dimanĉo, ni ŝatos kunesti kun vi ĝis tiam, do dum ok tagoj (aŭ sep programtagoj). Informoj kaj aliĝoj:

<http://www.esperantoland.org/nr/#nr>

Lu Wunsch-Rolshoven

## 26-A EŬROPA RENKONTIĜO EN NORDA FRANCIO



La Eŭropa Rendevuo de Stella okazas dum novembra semajnfino: En 2014 ĝi disvolviĝos de sabato la 15-a ĝis dimanĉo la 16-a de novembro. Okazos diversgradaj Esperanto-staĝoj kaj distraĵoj en amika etoso. Inter aliaj Katalin Kováts, redaktoro de edukado.net, gvidos lingvan kurson por helpontoj de la 100-a UK en Lille. Ŝi disdonos ankaŭ KER-atestilojn por la partoprenintoj de la 3a

Tutmonda Ekzamensesio de majo. La Eŭropa Rendevuo de Stella estas la plej grava Esperanto-aranĝo en norda Francio!

### Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

**Finredaktita: la 31-an de oktobro 2014**

**Redaktoro:** Zlatko Tišljár

**En la numero kunlaboris:** Halina Komar, Zlatko Tišljár, Maja Tišljár, Liba Gabalda, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Lu Wunsch-Rolshoven

**Kontakto:** [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

**Retpaĝo:** <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

